



Balenido

Merkredo, la 6-a de julio 2016

N-ro 5

Konatiĝu: Profesoro Aleksander Melnikov



Melnikov prelegas dum BET-52 pri lingvaj kaj movadaj temoj. Lia lunda prelego estis (sur la foto): "Eĉ esperantistoj kapablas ŝerci".

Melnikov estas el Rostov-na-Donu kaj mem verkis la suban prezentotekston.

Por oficialuloj mi naskiĝis en 1951. Por mi mem – en 1965. Ja ĝuste tiam mia panjo diris al mi, ke ŝi vidis afiŝon pri Esperanto-kurso. Internacia lingvo – tio estis io stranga, sekve, esplorinda. El pli-malpli 100 ekintoj restis nur du. Unu baldaŭ poste pruvis la faman konkludon de R. Schwartz “edzino – fino!” Por la dua – mi mem – Esperantio fariĝis parto de ... ĉio.

Tio dum ioma tempo eĉ kaŭzis bedaŭron de panjo, ke ŝi malfermis al mi tiun “skatolon de Pandora”. Ja necesis prepari la filon al studentigo, sed li pensas nur pri Esperanto... Tamen fin-fine evidentiĝis, ke Esperanto rolis en mia vivo pozitivite.

Profesio kaj kariero: Fininte la duan jaron (el la kvin necesaj) de kemistudado ĉe universitato, mi konkludis, ke mi verkos disertacion pri... Esperanto. Tamen se mi forlasus la universitaton, mi tuj estus rekrutita por du jaroj. Mi kaj la armeo estas du aferoj nekunigeblaj, tial mi preferis finstudi kaj ricevi diplomon de kemiisto, kio ebligis al mi instrui fizikon, kemion, biologion kaj



Programo

La 7-a de julio (ĵaŭdo)

08.00 – 09.00 **Matenmanĝo** (Manĝejo)

09.00 – 18.00 **Tuttaga ekskurso.** Forveturo je la 08.30 de la akceptejo (B. Sruogos str. 9)

13.00 – 14.00 **Tagmanĝo** – por la restintoj en BET (Manĝejo)

18.00 – 19.00 **Vespermanĝo** (Manĝejo)

19.00 – 20.00 **Spektaklo** de Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik (Kurhauzo, B. Sruogos 2)

20.00 – 21.00 **Koncerto de Mikaelo Bronŝtejn** (Kurhauzo)

La tuttaga ekskurso

Dum la ekskurso vi vizitos la plej belajn bienpalacon de la etnografia regiono Sūduva: la preĝejon de Zapyškis apud Nemano, la kastelmonton de Altoniškis, de kiu malfermiĝas pitoreska pejzaĝo al la valo de Nemano, la bienpalacon de Gelgaudiškis, kiun ĉirkaŭas malnova parko, unu el plej grandaj en Litovio. En la palaco vin atendas teatra ekskurso kun nobeloj, ĉasistoj kaj servutuloj de tiu epoko.

En Sudargas ĉe Nemano troviĝas kvin kastelmontoj, kiuj memorigas batalojn inter litovoj kaj kruckavaliroj kun kastelo de duko Sudargas, kiun kruckavaliroj forbruligis en 1317.

La bienpalacon de Zypliai fondis en la 19 jarcento Jonas Bortkovskis, nobelo el la gubernio de Polock. En 2012 tie estis fondita artgalerio kaj muzeo de la etnografia regiono de Znavykai.

La bienpalacon de Paežeriai, situanta ĉe lago, estas unu el plej bone konserviĝintaj en Litovio.



▷ paralele studi denove (la anglan), ĉar ne eblas doktoriĝi pri lingvistiko, havante diplomon pri kemio.

Intertempe venis perestrojko, kaj mi ekpovis labori kiel ... salajrata prezidanto de Esperanto-klubo, kion mi faris paralele al verkado de disertacio. Post longaj esploroj kaj burokratismaj baraktoj en 1990 decide de la Belorusia Ŝtata Universitato mia esploraĵo "La principoj de konstruado kaj funkcia evoluo de internacia planlingvo en la moderna lingvistiko" havigis al mi la titolon "doktoro". Kombino de miaj doktoreco kaj Esperanto-posedo rezultigis postenon de docento pri la angla ĉe inĝeniera akademio, ĉar ĝi komencis kunlaboron kun AIS kaj planis libervolajn Esperanto-kursojn. En 2004 mi defendis la duan disertacion, kiu montris, kial kaj kiel en Esperanto eblas produkti, konservi kaj transigi kulturaĵojn, kio similigas la Esperanto-komunumon al etno, kiujn specifajojn havas lingvopersoneco de "tipa esperantisto" k. s. Tio promociigis min al profesoro kaj ĉefo de fremdlingva katedro.

Preskaŭ ĉiuj miaj sciencaj verkoj (pli ol 70) temis pri interlingvistiko kaj Esperanto. Malgraŭ la onidira malprestiĝo de tiu scienca kampo en 2007 la Rusia ministerio pri scienco kaj edukado distingis min per Honorfolio. Kaj en 2009 mi fariĝis laŭreato de la premio "akad. Paul Ariste" (pro interlingvistikaj meritoj, 2009).

Persona vivo: Esperanto fariĝis por mi ne simpla hobbio, sed lernejo de komunikado (origine mi estas introvertito, sed nun oni apenaŭ divenas tion), fonto de plej diversaj scioj kaj spertoj (kiam en Sovetunio "sekso ne ekzistis" mi legis en Esperanto kontrabande ricevitajn "pornografian kaj kontraŭsovetian" laŭ tiama klasifiko "ABZ de amo" kaj "Bestofarmo" de Orwell). Prelegante aŭ gvidante Esperanto-kursojn kaj seminariojn, mi vizitis 43 landojn de kvin kontinentoj. Mi konatiĝis kun interesaj homoj, kiuj ne maloftas en la movado, kaj kun funkciuloj. Kiel prezidanto de SEJM mi kontaktis eĉ kun instruitoro de la Centra Komitato de la Komunista Partio – altega nivelo en tiu tempo – kiam fine de la 1970-aj la ŝtato decidis „ĉirkaŭbraki la sovetian movadon (fondi oficialan Esperanto-asocion)... por sufoki ĝin“.

Mi estis TEJO-Komitatano, ĉefdelegito de UEA por USSR, estrarano de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, vicprezidanto de SEU (postperestrojka tutsovetia unuiĝo, kiu ekzistis ĝis la disfalo de USSR), "Rusia esperantisto de la jaro 2004". Nun – aktuala UEA-Delegito en Rostov-na-Donu kaj membro de la Akademio de Esperanto.

Mi fieras, ke mi greftis amon al Esperanto al mia filino, kiu estas denaska esperantistino, premiito de Esperanto-poeziaj konkursoj "Liro" kaj Belartaj Konkursoj.

Do, Esperanto neniam perfidis min, kaj, mi esperas, ke mi neniam perfidis Esperanton...

Nova projekto de Mikaelo Bronŝejn



Fotoj: Gražvydas Jurgelevičius

La 5-an de julio, en rolo de la ĉefa vespera programero, furoris nova projekto de Mikaelo Bronŝejn.

Temas pri la recitalo "Pekaj kantoj". Kiel bazon de la koncerto la aŭtoro prenis la plej gravajn homajn pekojn el vidpunkto de Kristanismo. Por ĉiu peko Mikaelo verkis poemon kaj kanton, kiujn li deklamis kaj kantis. Kun la dua gitaro koncerton akompanis Sergio Straŝnenko.

Jen li prezntas sin: Mi estas Mikaelo (Moissej) Bronŝejn, 66 jarojn aĝa provincano. Mi naskiĝis en Ukrainio, kio estis ne tro grava en la jaro de mia naskiĝo. Ekde 1968 mi konstante loĝas en Rusio. Nuntempe tio gravas, ĉar evidentiĝis, ke mi loĝas eksterlande.

Ekster Esperantujo mi estas malinteresa vicdirektoro de negranda arbarprizorga firmao. Tiu malinteresa okupo tamen estas salajrata.

Zamenhofeco de la naskiĝloko postulis, ke mi estu denaska poligloto, do mi ekparolis tuj en tri miaj hejmlingvoj: la jida, la rusa kaj la ukraina. Knabaĝe, en 1962, mi akceptis Esperanton kiel la kvaran hejmlingvon, kaj ekde tiam mia vivo grandparte pasas en la esperantlingva medio. Bonŝance, en 1965 estis fondita SEJM, Sovetia Esperantista Junulara Movado, la rava komunumo, kiu



provizis kreaŭ inspiron al konsiderinda aro de gejunuloj. Ankaŭ al mi. Kiel rezulto de tiu inspiro aperis miaj unuaj kantoj kaj poemoj en Esperanto. Kredinde, sen tiu SEJM-inspiro mi restus daŭre kun la ruslingvaj rimoj, plektataj en mia cerbo ekde kvin-aŭ-sesjara aĝo. Cetere, la ruslingva rimado ne estis definitive forlasita; eldoniĝis en la rusa du originalaj poemaroj, favore akceptitaj de la poeziŝatantoj. Tamen ja en Esperanto – kvin... Kelkcent miajn poemojn mi transformis en kantojn, elmurmurante simplajn melodiojn. Restis amaso da nekantitaj sed tute taŭgaj por tio – ilin uzis Ĵomart kaj Nataŝa, Elena Puŝova, Asorti kaj aliaj profesiaj muzikistoj, kies melodioj, kompreneble, estas multe pli altkvalitaj ol la miaj. Per tio miaj poemoj gajnas plian belsonon.

La tradukarto interesas min. Trafosinte konsiderindan porcion da diverslingvaj teoriaj studoj mi trovis, ke io taŭgas por Esperanto-tradukado, sed io – absolute ne. Endis serĉi konvenajn praktikajn solvojn, kaj tion mi faras, pli-malpli sukcese esperantigante poezion kaj prozon, verkitan en ĉiuj miaj hejmlingvoj. Puŝkin, Brodskij, Ivan Franko, fratoj Strugackij, Sergej Lukjanenko, Mordeĥaj Gebirtig... Aparte interesa tasko estas traduko el Esperanto aŭ per Esperanto en la rusan, do mi rusigis multajn verkojn de elstaraj esperantaj poetoj kaj eĉ kvindekda himnoj por la ŭonbulista templo en Moskvo. Estus malracie avari pri la akumulita sperto. Organizinte studion pri la tradukarto Esperanta, mi ofertis la sperton al miaj lernantoj en Tiĥvin. Ankaŭ al kelkdeko de diverslandaj interesigantoj dum la seminarioj en multaj Esperanto-aranĝoj.

“La plum’ al kruda proz’ inklinas...” – diris Puŝkin, atinginte tridekjaran aĝon. Dek jarojn pli aĝa ankaŭ mi venis al simila matureco kaj sidkapablo. Poemon naskas kurta impulso de la inspiro. Prozverkado estas dolora, ŝvitiga, pena, longtempa, ofte eĉ enua laboro, kaj mi ne tuj kutimiĝis fari ĝin. Sed la prozverkoj estas pli aktive legataj ol la poeziaĵoj, do mi devis kutimiĝi – pro praktikaj konsideroj, ĉu ne? Nun mi produktas firman prozon. Du porinfanaj fabellibroj. Novelaro. Kvar romanoj. Pluraj noveloj, publikigitaj en “Beletra Almanako”, “Scienco kaj Kulturo” ... Kelkaj premioj ricevitaj. Dank’ al la tradukistoj, kiuj opinias ion-tion el Esperanto-prozo taŭga por lego ankaŭ de neesperantista publiko, miaj prozaĵoj aperis en la angla, franca, rusa kaj sveda lingvoj.

En 1991 por la unua fojo mi vizitis la Okcidenteŭropan landon, Francion, kaj en la Kultura Festivalo, en Parizo, prezentis tri aŭ kvar miajn kantojn. La francoj opiniis, ke mi estas filo de Trockij. Misopinio, certe, sed, eble, dank’ al tiu mi ricevis inviton turnei, t.e. koncerti kaj prelegi en la lando. La unua turneo do okazis en Francio kun dudeko da urboj vizititaj. La starta fameto kaŭzis invitojn al aliaj landoj, kaj dum pli ol dudek jaroj, anstataŭ sunbrunigi la ventron ĉe iu suda marbordo, mi uzis miajn feriojn por prelegvojaĝi. Restis tri aŭ kvar eŭropaj landoj, kie oni




ne aŭdis min, sed kompanse estas alikontinentaj (Usono, Koreio), kie ja mi estis aŭdita.

La amasaj Esperanto-aranĝoj aparte logas min pro la eblecoj komunikiĝi kun la geamikoj enlandaj kaj alilandaj. Mi direktis la organizon de kelkaj amasaj renkontiĝoj en Tiĥvin, kaj, kune kun la kluba organiza teamo, mi fieras pri la rezulto, ĉar ĉiu el la averaĝaj 100-150 partoprenantoj restis kontenta. Dum mia vivo mi partoprenis en dek UK-oj, foje pli, foje malpli aktive kunlaborinte en la programo. Ne maltrotaksante la rolon de UK-oj, mi nun (eble, pro la aĝo) preferas t.n. “ĉambrajn” aranĝojn kun 100 – 300 partoprenantoj, kiel ekz. IF en Germanio, Arkones en Pollando, naciaj kongresoj en Israelo, Italio, Svedio k.a. Aparte mi devas diri pri BET. Ne por flati. Ĝuste BET en 1963 (Varska, Estonio), mia unua Esperanto-aranĝo, por mi, dektri jarojn aĝa, iĝis revelacio kaj grave influis mian elekton de la vivo-vojo. Partopreninte en BET-oj pli ofte ol en UK-oj, surbaze de mia propra sperto mi senhezite diru, ke BET estas stabila multifaceta aranĝo, same interesa por spertaj lingvoposedantoj kaj por komencantoj. Do vican fojon aliĝinte al BET, mi deziru al la organizantoj plensukcesan efektivigon de ĉiuj planoj. Laŭeble mi provos helpi tion. Mikaelo Bronŝtejn, Tiĥvin, Rusio.

Invito al kvizo


La mondfama kviz-faranto Marian Zdankowski el Pollando invitas ĉiujn al kvizo, kiu okazos vendrede ja la 15-a horo. Por la venkintoj atendas premioj, eĉ monpremioj... En teamo, kiu organizas la kvizon, estas helpantoj: Tereza Pomorska, Mirka Kubicka, Helena Biskup, Eduard Kozyra...



Inter demandoj dum la kvizo aperos ekzemple: "Skribu du antaŭnomojn de la lasta vivanta nepo de nia majstro." "Skribu la nomon de Papo-esperantisto". "Kie okazos Universala Kongreso de Esperanto en 2018?" "Kion signifas la mallongigo LKK (du versioj)?"

Eduard Kozyra

Lanĉo de novaj tradicioj



La unuan fojon en la 25-jara historio de Ukrainia Esperanto-Asocio la kongreso de UkrEA okazos ne la kutiman unu tagon, sed tri!!!

La datoj: 25-27. 11.2016 en Kiev. La programo antaŭvidas krom la kutimaj kongresaj temoj ekskurson tra historiaj lokoj, kulturalan kaj

amuzigan programojn... La prezoj estas tre tolereblaj: ekz. la aliĝkoto – 5 €, dunokta dormado – 16 €. Kosto de la manĝado dependas de la apetito... Bonvenon!

Kontakti eblas lineckij@bigmir.net, skajpe: m-urso, tel. +380638493193 (Viber), +380992125705, www.ukrea.com.ua.

Mikaelo Lineckij

Instruista trejnado

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznan, Pollando) kaj ILEI denove kune organizas unujaran instruistan trejnadon, kiu disponigas la bazajn konojn, necesajn por instruado de Esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko.

La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka intensa semajna sesio (la unua okazos 17-23.09.2016, la dua 04-10.02.2017) kaj intertempan hejman laboradon, retajn taskojn kaj konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj fine pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kun la fina ekzameno okazos en septembro 2017. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado.

El la Programo: Lingvopedagogio (Katalin Kováts, Ilona Koutny, Zsófia Kóródy). Bazaj faktoroj de lingvopedagogio (instrumetodoj, instruprocezo, evoluigo de kapabloj, taksado, lingva interfero, ktp.) Esperanta metodiko (instruado de elparolo, gramatiko, vortoprovizo kaj kulturo, planado de lecionoj kaj kursoj ktp.). Instruhelpiloj (de instruista kofro tra eldonaĵoj, filmoj ĝis retkursoj). Esperanta kulturo (Tomasz Chmielik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Ilona Koutny). Plej gravaj eventoj de la historio de Esperanto. Ĉefaj periodoj kaj verkistoj de Esperanto. Lingva trejnado (per testoj). Donaco: partopreno en la aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj. Kondiĉoj: bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri Esperanto-ekzameno



estas bonvena) kaj baza kono de Esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).

Partoprenkoto: A-landoj: 300 EUR, B-landoj 130 EUR por unu semestro. ILEI-UEA ofertas 4 stipendiojn kaj edukado.net finance helpas studenton de RITE.


Informo kaj aliĝo: ĝis la 15.08.2016: interlin@amu.edu.pl aŭ ikoutny@amu.edu.pl, www.amu.edu.pl~inter/

Gvidlibro tra Esperantio

estas populara referenca libro, kies subtitolo jenas: “Konciza leksikono de la Esperanto-kulturo: esperantonimoj, realioj kaj flugilhavaj vortoj”.

Kaj, verdire, multo pli. Ĝi enhavas A–Z de faktoj pri la plej gravaj datoj de la Esperanto-movado, la plej eminentaj esperantistoj (verkistoj, interlingvistoj, instruistoj, movad-gvidantoj), pri la festoj kaj tradicioj de la movado, pri organizaĵoj, pri diskutoj koncerne la lingvon mem kaj la strategion de la movado, pri la plej gravaj dokumentoj de la movado ktp. Krome enestas pli ol 100-paĝa suplemento de zamenhofaĵoj, manifestoj, poemoj, rezolucioj kaj literaturaj eltiraĵoj.

La libro estis lanĉita dum la lasta UK en Lillo kaj nun restis nur deko da ekzempleroj. Dum BET vi povas aĉeti la libron ĉe la aŭtoro (Aleksandro Melnikov) aŭ en la libroservo. Rapiĉu. Baldaŭ la libro elĉerpiĝos.



Ĉu vi jam vizitis la libroservon?

Ĝi troviĝas dekstre de la manĝejo, str. B. Sruogos 6, en Odontologia kliniko. Atendas vin multaj interesaj Esperantaj libroj, diskoj kaj aliaj esperantaĵoj!!!